

## **1.a DIMANĈO DE ADVENTO 1an de decembro 2013**

***VIGLU KAJ ESTU PRETAJ POR LIA ALVENO.***

**– Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Mateo 24, 37-44**

**En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:**

**«Kiel okazis en la tempo de Noa, tiel estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Ĉar antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, ĝis Noa eniris en la arkeon. Neniu suspektis ion, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn. Tiel ankaŭ estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Tiam se du viroj estos sur kampo, unu estos forprenata kaj la alia lasata. Se du virinoj estos laborantaj ĉe muelilo, unu estos forprenata kaj la alia lasata.**

**Do viglu: ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos. Sed tucerte, se la domomastro scius en kiu noktoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian pordon disbati. Tial ankaŭ vi estu pretaj, ĉar la Filo de la homo venas kiam vi ne atendos».**

Por klopodi kompreni la pecon de la evangelio kiun la liturgio prezentas al ni en tiu ĉi unua Adventa dimanĉo, ni devas ĝin enmeti en ĝian kuntekston, retroiri do je kelkaj versikloj. Ni do komencu de versiklo 33 de ĉapitro 24 de la evangelio de Mateo.

Skribas la evangeliisto: *“Tiel ankaŭ vi”,* diras Jesuo, *“kiam vi vidus ĉiujn tiujn aferojn sciu ke li estas proksima, al la pordoj.”*

Jesuo anoncis la detruon de Jerusalemo kaj, per la detruo de la templo de Jerusalemo, sidejo de la juda religia institucio, komenciĝas la tempo en

kiu la Regno de Dio ĉesas esti ekskluziva apanaĝo de la popolo de Izraelo, sed ĝi estas vastigata al la tuta homaro. Jesuo do ne vidas ĝin kiel sortobaton, sed kiel eliminon de tio kio estis malhelpo por la plano de Dio super ĉiuj popoloj.

Dio ne povas esti alproprigata de iu, de iu nacio, de iu religio. La amo de Dio estas universala, la fino de la Regno de Izraelo do, por Jesuo koincidas kun la komenco de la Regno de Dio. Kaj Jesuo estis certiginta: *"Ververe mi diras al vi: ne pasos tiu ĉi generacio antaŭ ol ĉio tio okazos"*, fakte la generacio al kiu Jesuo sin adresas spektos en la jaro 70 la invadon flanke de la romianoj kaj la detruon de la templo de Jerusalemo. Kaj Jesuo certigas: *"La ĉielo kaj la tero"*, esprimmaniero por diri ĉion ajn, *"forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos"*.

Jesuo do garantias tion kion li diris je la fino de la parolado ĉe la monto, certigante ke por ke ne forpasu la ĉielo kaj la tero, nek unu joto nek unu streketo forpasos de la leĝo, antaŭ ol ĉio estos plenumita, kaj li indikis ke la promesoj rilatantaj la Regnon de Dio certe plenumiĝos.

Kaj, je ĉi tiu punkto, Jesuo asertas: *"Koncerne tiun tagon kaj tiun horon"*, kaj ĉi tie li estas parolanta pri la individua fino, ne pri la horo de Jerusalemo, *"neniu ĝin scias, eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo kaj eĉ ne la Filo, sed nur la Patro."*

Por ĉiu generacio kiu forpasas, estas iu fino de la tempo, sed tion scias nur la Patro. Kaj ĉi tie Jesuo enmetas la ekzemplon de la tempoj de Noa, ne por riproĉi la samtempulojn de Jesuo, kiam li diras: *"Kiel okazis en la tempo de Noa, tiel estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Ĉar antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis..."*, Jesuo ne estas riproĉanta pro tiuj sintenoj, sed li volas diri ke, komplete ensorbitaj en la ĉiutagaĝoj de la vivo, ili ne rimarkis tion kio estis okazonta.

La agadoj de la normaleco do, la ĉiutagaĝoj, riskas ne rimarkigi la eksterordinaron kiu estas okazanta. Tiam Jesuo diras: *"Du viroj estos sur kampo, unu estos ..."* la verbo utiligata en tiu kunteksto signifas 'akcepti', kiel kiam la anĝelo diras al Jozefo ne timi akcepti Marian kiel sian edzinon. Do iu 'estos akceptita', por doni al li savon, 'kaj la alia forlasita', kaj tiel ankaŭ la virinoj.

Kion volas diri Jesuo? La arkeo konstruita de Noa ne akceptis ĉiujn, sed nur tiuj kiuj rimarkis la minacantan katastrofon. Tute same la Regno de

Dio estas savpropono por ĉiuj, sed ĝi ne estas de ĉiuj, ĉar eniri en la Regnon estas frukto de libera elekto favore al la beateco de la malriĉo. Jesuo estis dirinta en tiu ĉi evangelio: *"Beataj la mizeruloj por la Spirito ĉar de tiuj estas la Regno de la Ĉieloj"*.

Tiuj kiuj ĝin elektas estas akceptataj, kaj tiuj kiuj ĝin ne elektas estas male forlasataj. Kaj Jesuo daŭrigas dirante: *"Do viglu: ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos"*. Tiu invito al viglado estos redirata post nelonge en la drama momento de Getsemano. La alveno de la Sinjoro estas do kunigita al la viglado kaj indikas ke tiu estas la momento de la persekuto, de la mortigo de la siaj.

Pro tio Jesuo al la Beatecoj, al la unua beateco, tiu kiu permesas la realigon de la Regno de Dio, kunligis la lastan beatecon, la persekuton kiu eksplodas. Tiam Jesuo invitas ne resti nepreparitaj antaŭ tio. Kaj li diras: *"Sed tutcerte, se la domomastro scius en kiu noktoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian pordon disbati. Tial ankaŭ vi estu pretaj, ĉar la Filo de la homo venas kiam vi ne atendos."*

La sekvanto de Jesuo scias ke ĉar li estas konstruanto de paco por la aliaj, propra paco estas ĉiam malfirma kaj, en ĉiu momento, povas eksplodi neatendita la persekuto, kiu estos des pli perforta ju pli neatendata estas ĝia origino. *Jesuo estis dirinta ke la frato transdonos por mortigo la fraton, la patro sian propran filon.*

La invito de Jesuo do estas invito renovigi la elekton por la Regno de Dio, bone konsciante ke tiu elekto implicas la persekuton, sed estante certaj ke la Dio de Jesuo, la Patro, estas ĉiam flanke de la persekutatoj kaj neniam flanke de tiuj kiuj persekutas.